Pri la malica tendenco de homoj

Homoj, antaŭtempe kaj nuntempe ofte emis tagfantazii menskreajn mondojn por eskapi el societo, kies trudaj konvencioj estas vere opresaj. Fabeloj pri feoj, magiaj regnoj, kaj supernaturaj estaĵoj servas kiel psikajn ŝirmejojn, proponante ŝildon kontraŭ kruelaĵoj aŭ fiuloj (la plimulto de societo), kiuj katenas nian spiriton per malicaj sociaj postuloj, kaj ĉiutagaj bagateloj.

Kutima socia interago estas fonto de animmizero, inkluzivante honton pri nia korpaspekto, malaprobon, kaj miskomprenojn.

Tamen, feoj kaj fabelaj estaĵoj ekzistas en iu mondo, kiu ne inkluzivas socian malicon. En Fabeloj, iu persono povus amikiĝi kun feoj per reciproka montro de bonkorsento, nehavante la neceson serpentumi tra mokaj grimacoj.

Interago kun aliaj estas ĥaosa ago! Personaj kondutoj estas neantaŭvideblaj, kaj interhomaj rilatoj postulas konstantajn intertraktojn. Tamen, dum fantaziado, la regularo estas klara!

Homoj, ĝenerale, havas venĝemajn inklinojn. Feoj, male, enhavas simpatioplenan koron ene de si. Fantaziado liberigas al iu vojeton al iu harmonie ĝoja restadejo!